



LA FERVOJISTO

ITALA FERVOJISTA
ESPERANTISTA ASOCIO

A. I. F. E.

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI
Dopolavoro Ferroviario - Via XX Settembre 17
VERONA (Italia)

INFORMA BULTENO

Nº 8 = MAJO 1952a

SALUTO DE LA ITALAJ FERVOJISTAJ ESPERANTISTOJ al la gekolegoj kiuj kongresos en Lindau

Estas kun granda plezuro ke ni konstatas ke nia movado provas ĉiam pligrandan viglecon en ĉiu lando, ankaŭ se tio okazis ne tiel rapidis kiel estas en niaj deziroj.

Tamen, ĝi estas konstanta, metoda, kaj bone esperiga por la estonto se nenio venos por maltrankviligi la normalan kaj pacan vivritmon de la popoloj.

Tiu ĉi estas varmekora bondeziro kiu ni faras, ĉar se la agema, trankvila homara aktiveco, ne estas eble disvatigi Esperanton, ne estas eble realigi la sento klare esprimita de ĝia kreinto, Dro Zamenhof, en sia himno "ESPERO" por kiu, post esti laudinta la sankta harmonio de la tuta mondo militanta sub la signo de la espero, tiel li finas:

NIA DILIGENTA KOLEGARO
EN LABORO PACA NE LACIĜOS
ĜI LA BELA SONGO DE L'HOMARO
POR ETERNA BEN'EFKTIVIĜOS

Kaj la fervojistaj Esperantistoj kiuj kunvenos en Lindau, spite de malfacilaĵoj, malferminte kaj ferminte kongreson per la solena kanto de la himno Espero, estos promeso kiun ili faros al Dro Zamenhof, ilia unua granda Majstro, kaj al si mem, ke ili nenian laciĝos disvastigi Esperanton, ĝis kiam ilia bela songo ne realiĝos en efektiva bono por la tuta homaro.

Estas kun tiu ĉi promeso, ke la italaj fervojistaj esperantistoj prezentas sian saluton al gekolegoj kiuj en Lindau kunvenos pro fruktodona laboro.

LA KONSILANTARO de la A.I.F.E.

BOLOGNA = KUNVENO
=====

Dimanĉon 27. an de Aprilo pasinta, je la h. 14. = okazis en Bologna la anoncitan kunvenon al kiu ĉeestis multnombraj partoprenintoj kiuj alvenis el diversaj urboj kie ekzistas grupojn de Esperantistoj.

Senkulpigis ilian neĉeeston Zoratti el Udine kaj Rose el Trieste. Sendis saluton al kunvenintoj la Sekretario de I.F.E.F. Kolego LOK el Amsterdam.

La kunvenon malfermis kolego Zacconi kiu dankis la kunvenintoj pro ilia partopreno kaj por la elekto de Bologna kiel sidejo de la kunveno, kaj li proponis ke estu nomata, por direkti la kunvenlaboro, Dron Spadafora, Prezidanto de A.I.F.E.

Tiu ĉi siavice, renovigante la dankon por la ĉeestantoj, kiuj spite la malhelpaĵoj tamen estis partoprenintaj la kunvenon, dankas pro la bona organizado de la kunveno, kiu estas speciala merito de la kolegoj de Bologna, invitis paroli la sekretario de la AIFE, kiu legas raporton per kiu li rimarkigas la ĉiaman kreskantan de la Asocio, kavrobligita en la nombro de siaj membroj kaj grupoj, instigante ĉiun Asocianon doni konstantan aktivecon por la kreskado kaj pligrandiĝo de Asocio.

Poste ili klarigas kiel estu des pli necesa flanke de la Fervoja Administracio la rekono de "AIFE" eĉ nur kiel fako de l'Fervojista Postlaboro, en la certeco ke tiu ĉi rekono helpos la disvastigon de nia movado.

Je tiu ĉi intenco, li proponas ke post la Lindau- kongreso, estu kompilita memorandon kiel eble plej multa dokumentita, por ĝin prezenti al kompetentaj fervojaj aŭtoritatuloj petanta de ili la suprecititan rekonon.

Li demandas al ĉeestantaj kolegoj, se ili ne opinias oportune demandi al Kongreso en Lindau, ke la Via Internacia Fervojista Esperanta Kongreso estu okazonta en Italio, kaj tio kun la celo pruvi antaŭ ĉio, el eksterlandaj kaj italaj kolegoj, kiuj ankoraŭ ne estos niaj anoj, nian maturecon, kaj due, por fari bonan propagandan por la Esperanto kaj pruvi al nia fervoja Administracio sekve de la Kongreslaboroj, kiom utile estus por la Administracio mem sia rekono, tiel plene konfirmante la enhavon de la memorando, kiu ni estu prezentinta, se por tiam ĝi ankoraŭ ne estus rekoninta.

Malfermita le diskutadon al kiu ĉiuj partoprenis, la ĉeestantoj, oni alvenis al jenaj konkludoj:

- 1e) - daurigi en la laboro de varbado kaj de propagando, ĝis nun okazigita de la D.K. por ĉiam pli granda disvatigo de la Asocio.
- 2e) = Post Lindau prezenti al la Fervojstaj kompetentaj aŭtoritatoj, memorandon, tutplene dokumentatan, por la rekono de AIFE.
- 3e) = Peti al Kongreso en Lindau, kie la Italaj partoprenos per la nombro de 20 delegitoj, ke la 6a Internacia Fervojista Esperantista Kongreso, okazu en Italio.
- 4e) = Sin prezenti en Lindau kun konkretaj proponoj por la laboro plano kiu estu pridiskutota en intertempo je la 4a kaj la 5a Kongreso.

La kunveno finis je la h. 18. = per "Ĝis revido" reciproka inter ĉiuj ĉeestintoj la Nacia Kongreso en Bologna, se iaj necesoj ne devigos nin pli frue renkontiĝi ĉe nova kunveno.

FERIO - SEMAJNO EN NEDERLANDO

La "Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda" petas nin empresigi la jeanan anoncon:

Okaze de la 6a Kongreso de la Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda en Zwolle (14-20 Sept. 1952) ni okazigos ferio semajno ankaŭ por ne-esperantistaj fervojistoj.

Tranoktado en amasloĝejo aŭ ferio-dometoj en arbara loko apud Zwolle.

Por la tuta semajno la kostoj estas po. Fl. 25.00. En ĉi tiu prezo 7 tranoktoj estas enkalkulitaj. Antaŭ tendumi en kunportita tendo estas permesate; por tio la prezo estas malpli alta.

Interesaj ekskursoj al Amsterdam, Marken, Vlendam kaj vizito al la FERN-Kongreso la 18/9 ktp.

Anoncu vin baldateble, sed nepre antaŭ la 1a de aŭgusto ĉe W. Gelderman, Lindestraat 57, Zwolle, Nederlando.

=====

RADIO ROMA - Esperanto Fako - Via Veneto 56 - ROMA (Italia)

Dissendosj en Esperanto - Detala programo

JUNIO 1952

- Merk. la 4.an - Turismo: La kastelo de Graines en Valo de Aosta
Vend. la 6.an - Grava fonetika eksperimento al kiu ni petas multenombrian partoprenon (Laŭ iniciato de la redacio de SCIENCA REVUO).
Merk. la 11.an - Italaj komponistoj: Antonio Stradivari (a)
Vend. la 13.an - La Kristaneco: La civila misio de la kristana Romo (b)
Merk. la 18.an - Rekonstruado de Kalabrio (Calabria) (c)
Vend. la 20.an - Itala literaturo: Chanson de Roland. (b)
Merk. la 25.an - Programo por la geknaboj: PINOKIO - 6.a sceno Verko de C. Collodi. Trad. M. Marchesi
Vend. la 27.an - La Kristaneco: Sankta Paŭlo (b)

JULIO 1952

- Merk. la 2.an - Turismo: de Genova al Ventimille (a)
Vend. la 4.an - Respondoj al la geaŭskultantoj (b)
Merk. la 9.an - Italaj komponistoj: Giacomo Carissimi (a)
Vend. la 11.an - La Kristaneco: Sankta Jaronino (b)
Merk. la 16.an - Fabeloj de la tuta mondo: "La mikinoj" el novelo originale verkita en Esperanto de S-ino E. FEIGENBUTZ (Germanujo)
Vend. la 18.an - Itala literaturo: Luigi Pulci (b)
Merk. la 23.an - Programo por la geknaboj: PINOKIO 7a sceno
Vend. la 25.an - La Kristaneco: Sankta Augusteno (b)
Merk. la 30.an - Italaj urboj: Bergamo (a)

- =====
- Mallongigoj: (a) = Prof. A. BLASIMME
(b) = Prof. V. MUSELLA
(c) = Prof. L. MINNAJA

Horindiko: Itala horo Kaj Mez-Europa Tempo: de 19.00 ĝis 19.20

Stacioj (mallongaj ondoj): m. 25.21 = Kc/s. II.900

m. 31.35 ĉi Kc/s. 9.570

m. 49.92 = Kc/s. 6.010

Diskonigo kaj represo de tiu ĉi programo estas dezirata.=

Adreso: Radio Roma - Esperanto - Via Veneto 56 - ROMA (Italia);
tial bv. ne aldoni iu ajn personan nomon (ĉu de la Esperanta-Voĉo,
ĉu de la kunlaborantoj, ĉu de la intervjuistoj!)/

LA ESPERANTA VOĈO

A. Blasimme

=====

PROZAĴO = KURBA VOJO

Amerikano rakontis ke en la orientaj ŝtatoj de Usono la rapida vagonaro, en kiu li veturis, venis foje en lokon, kie la relvojo estis ekstrema kurba. Esti malluma nokto, la vagonaro rapidis kiel sago, kiam subite la maŝinisto rimarkis du grandajn lumojn antaŭ la lokomotivo. Li semprokraste haltigis la vagonaron por eviti katastrofon. La du lumoj antaŭ li restis sur la sama loko. Li malsupreniris de la lokomotivo por esplori la aferon, sed imagu la surprizon; proksimiĝinte li ekvidis la du malantaŭajn lanternojn de la lasta vagono de sia vagonaro. Tiel Kurba tie la vojo.

=====

PRI LA LABORKUNSIDOJ DUM NIA 4a KONGRESO en LINDAU

T A G O R D O

- I° = Malfermo
- 2° = Salut-kaj ricevitaj leteroj
- 3° = Rimarkigoj pri la raporto de la pasintjara kongreso.
- 4° = Raportoj de la sekretario kaj kasisto
- 5° = Raporto de la Terminara Komitato
- 6° = Proponoj
- 7° = Estrarelekto
- 8° = Elekto de kaskontrol-Komitatano
- 9° = Elekto de la kongresloko en 1953a, kaj la provizora en 1954a.
- 10° = Libera diskutado.
- 11° = Fermo de la laborkunsidoj.

=====

ssssssssssssssssssssssssssssssss